

# ESPERANTO

## ★ TRIUMFONTO ★

Publikigilo de multaj gravaj Esperantistaj organizaĵoj.

Aperas semajne. — Senpagaj monataj aldonoj: „Internacia Komercio“ kaj „Revuo“ (literatura, popolscienca).

Protektantoj:

D-o Leono Zamenhof, Warszawa  
W. M. Page, advok., Edinburgh  
Ernest Archdeacon, Paris  
J. Gili Norta, komercisto,  
Barcelona

H. Fischer, grandindustriisto,  
București  
Frans Schoofs, Antwerpen  
P. v. Medem, bank-kaj fabrikk-  
direktoro, Kaunas.

N-o 174  
13. 1. 1924

Redakcio:

Cefredaktoro: Teo Jung.  
Redaktoro: Robert Kreuz.  
Redakciaj kunlaborantoj:  
H. Jung kaj M. Butin. L. K.

Administracio:

Horrem b. Köln, Germanlando

Abonprezo

po numero egalvaloro de 0,06 dolaro  
aŭ 0,30 sv. fk. por landoj, kies valuto  
sufertis maksimume 50%; por ĉiuj aliaj  
landoj 0,05 dol. aŭ 0,25 sv. fk.

Anonprezo

po kvadrat-centimetro egalvaloro de  
0,20 sv. fk. (ĉe antaŭa pago 0,15 sv. fk.),  
en „Internacia Komercio“ la duoblo.

Antwerpen, Barcelona, București, Edinburgh, Horrem, Kaunas, Paris, Warszawa

### Akademio kaj Lingva Komitato.

La prezidanto de la Akademio kaj de Lingva Komitato ĵus forsendis cirkuleron, kiun ni represas tie ĉi.

Post la diversaj elektoj de 1923, la Akademio konsistas nun el:

Prof. Th. Cart, Prezidanto, S-o J. M. Warden kaj D-ro J. Dietterle, Vic-prezidantoj. Prof. E. Grosjean-Maupin, D-ro W. Lippmann, D-ro E. Privat, Direktoroj de la fakaj Sekcioj, S-ro W. Bailey, Prof. P. Christaller, D-ro P. Corret, Prof. A. Dombrowski, [S-o E. Evstiféieff], S-o V. Inglada, S-o Isbrücker, S-o E. Kühn, S-o P. de Lengyel, Prof. B. Migliorini, S-o E. A. Millidge, S-o P. Nylén, membroj.

Akademijaj Korespondantoj: S-o Rollet de l'Isle (Sciencja kaj Teknika Vortaro), S-o W. Setälä (Finna lingvo), S-o M. Solá (Kataluna), S-o A. Tellini (Ladina), D-ro Leono Zamenhof (Pola).

Sekcio Komuna Vortaro: Prof. Grosjean-Maupin, Direktoro, S-o Bailey, Millidge, Collinson, Stojan, membroj.

Sekcio Gramatiko: D-ro Lippmann, Direktoro, S-o Christaller, Corret, de Lengyel, Collinson, Stojan, membroj.

Sekcio Konkursoj kaj Premioj: D-ro Privat, Direktoro, S-o Isbrücker, Kühn, S-ino Hankel, S-oj de Ménil, Strøele, membroj.

Mankas ankoraŭ, por ke niaj Lingvaj Institutioj estu plene reorganizitaj, granda parto de la ruslingva reprezentantaro. Bedaŭrinde sen respondo ĝis nun restis la leteroj de l' Prezidanto, ĉu ĉar ilin ne ricevis la korespondantoj en Rusujo, ĉu ĉar iliaj respondoj ne alvenis Francujon. Tamen oni rajtas esperi, ke la petitaĵoj sciigojn la Akademio ricevos fine kaj ke antaŭ la Wiena Kongreso ĉio estos en plena ordo.

Sekcio Komuna Vortaro. — La esperantistoj, jam sufiĉe multnombraj, kiuj sendas al la faka Direktoro manuskriptojn por tralegado rilate la vortaron, estas petataj sendi kun la manuskripto 10 francajn frankojn (aŭ saman valoron). La Direktoro sciigos poste la aŭtoron pri la de li definitive pagota sumo, kiu dependas de la amplekso kaj de la pli malpli bona stila valoro de l' manuskripto.

En Presado. — Prof. Grosjean-Maupin: Oficiala Radikaro, kun tradukoj en franca, angla kaj germana lingvoj kaj esperanta difino de l' vortoj, kies signifo povas esti duba.

La sama kun tradukoj en aliaj lingvoj aperos poste.

Malprave oni ripoĉus la Lingvajn Institutiojn, ke tro modestaj estas iliaj laboroj (3-a Aldono, Vortaro de la oficialaj radikoj, Korekto de la eraraj tradukoj en U. V.). Oni ne rajtas forgesi, ke post longa milito la unua tasko estis ilia reorganizado kaj aliflanke ke, en la postmilita periodo, kiam ĉiu nacio emas vivi »ĉe si«, kiam internaciaj rilatoj preskaŭ ne plu ekzistas, kiam en multaj randoj malpli sentebla fariĝis la bezono pri internacia lingvo, kiam la financa demando ĉion malfaciligas, modesteco estas forto: modesta fajro, se tiuj, kiuj zorgas pri ĝi, estas obstine persistemaj, daŭras, dum paja fajrego momente brilas, sed baldaŭ estingiĝas de si mem aŭ sub la akvo de la alkurintaj pumpistoj! — Ni estu obstine persistemaj, ni laboru senbrue kaj, kiam pli helaj tagoj venos, kiujn ni ankau sur diversaj kampoj klopodos por kiel eble baldaŭigi... tiam, se ni esperantistoj, dank' al nia severa

lingva disciplino, — de ĉiuj pri ĉiuj punktoj fine akceptiata, — sciis konservi al nia lingvo ĝian internacian unuecon, ĝian vortaran simplecon, ĝian komunan facilecon, nenia forto, nenia kontraŭbato malhelpos la triumfon de nia Zamenhofa Esperanto!

Th. Cart,

20 dec. 1923.

Prezidanto de la L.K. kaj de ĝia Akademio.

### Socia vivo.

Socialaj studoj.

De Otto Bonte, Frankfurt a. M.

Ni publikigas nun du respondojn al la artikoloj en ET 165-167 pri la problemoj „Efektiva kaŭzo de militoj“. La unua pritraktas la demandojn sur bazo de racia scienco, la dua sur fundamento de kristana biblio.

Efektiva kaŭzo de militoj.

I.

En numeroj 165-167 de ET sinjoro Civinski el Petrograd pritraktis la temon „Efektiva kaŭzo de militoj“ en granda perspektivo, kritikante la tri ĉefajn ideojn pri forigo de militoj, marksismon, anarhiismon kaj pacifismon kaj proponante sian propran doktrinon, kiun li devenigas de l' principo de relativeco. Lia argumentado certe renkontos dubojn kaj kontraŭdirojn. La reprezentantoj de la tri traktitaj doktrinoj diros, ke la verkinto ne trafis la veran esencan de iliaj teorioj, kaj la filozofio dubos pri la interrilato de la Civinski ideo kun relativismo.

„La marksanoj predikas kiel simplan solvon de la problemoj pri malapero de militoj: forpeli aŭ nenigi kapitalistojn el ĉiuj landoj de la mondo kaj milito tuj — samhore kaj eterne — malaperos.“ Tion diras la aŭtoro. Tamen la marksanoj respondos, ke ili vidas kaŭzon de la milito ne en personoj, la kapitalistoj, sed en sistemo, la kapitalismo. La principon de l' kapitalismo ili trovas en profitemo kiel instiganto de ekonomia vivo. Se ne plu la profito, sed la komuna bezono reguligos la produktadon, la kaŭzo de milito malaperos laŭ marksisma opinio. Oni vidas, ke estas pli malfacile sterigi tute novan ekonomian sistemon ol forpeli aŭ nenigi certan nombron de personoj. Sed la vera marksano eĉ ne diras: nenigi la kapitalisman sistemon! Ĉar li konas la historian metodon de la majstro, kiu diris, ke ne homa intenco kapablas ŝanĝi la mondon, sed nur la propra evoluo de la cirkonstancoj mem. Tial la marksano ne diros: forigu la kapitalismon kaj tuj la milito malaperos, sed: ekzameni la tempon, ĉu la cirkonstancoj estas oportunaj al ŝanĝo de l' profitsistemo al bezonsistemo! Kaj se estas, ekkaptu la okazon, ne kontraŭstaru al evoluo, helpu la tempon, kiu estas via! El tiu de Marx kaj liaj sukcesintoj profunde fondita teorio la artikolo de sinjoro C. ne permesas ion diveni, kaj tial ĝi ne povas pretendi esti trafa kaj efika refuto de l' marksismo.

La anarhiismo — laŭ sinjoro C. — deklaras la registaron kaŭzo de militoj. „Ĉiu regna potenco estas terura malĉasto kaj deveno de ĉiu sociala krimo kaj malbono sur tero; sekve forpeli kaj nenigi ĉie en la mondo la regnan potencon! Tiam ĉiu tera malbono, kaj kun ĝi la milito tuj malaperos.“ Tiu priskribo certe ne ilustras la esencan de la anarhiismo. Pli vere ĝia principo estas la kredo al la natura bono en la homa animo. Se oni donos liberan agadon al la homoj, ĉiuj faros bone. Se oni volas ilin devigi al la bono, oni per tio forprenas al ili la forton por fari la bonon. La pedagogo ofte faras tiun sperton en sia eduka sfero. Infanoj, kiujn oni neniam punas, estas pli kapablaj fari la bonon ol la multe punataj. Tial ne nur la ekzisto de registaroj, sed ĉiu nekredo al la bono en homa animo estas kaŭzo de ĉiu malbono kaj ankaŭ de milito.

Same la teorio „pacifismo“ estas malguste difinita de la aŭtoro. „Forpeli tute kaj ĉie el mondo la militistaron, rifuzo kaj ne iru mem

servi en militistaron, kaj tiam nek kapitalistoj nek registaroj sukcesos aranĝi militon, ĉar tiam forestos la por tio necesa militistaro, kaj tiel milito tute nature kaj certe malaperos.“ La pacifistoj tamen ne estas tiaj naivuloj kiuj diras: forpeli militistaron! Per kio forpeli? Eble per alia militistaro? Tio vere estus pacifista agado! La pacifismo ja ne estas tiel unueca teorio kiel marksismo kaj ankaŭ anarhiismo. Pacifismo estas ĉiu klopodo, kies celo estas malapero de militoj. Inter pacifistoj estas multaj diversaj skoloj. Oni eĉ povus nomi marksanojn kaj anarhianojn pacifistoj, se ili rigardus forigon de militoj kiel ĉefan celon. Unu el tiuj skoloj estas certe la militservo-rifuzantoj, kiujn la aŭtoro mencias per la frazeto: Rifuzo kaj mem ne iru servi en militistaron! „Neniu povas dubi, ke se ĉiuj rifuzos esti militistoj, milito efektive malaperos. Ankaŭ sinjoro Civinski ne povas dubi, sed li forgesas la diritan frazeton en sia posta refuto. La problemoj restas en la du vortoj „se ĉiuj“; tion ni ankoraŭ pritraktos. Aliaj vojoj de l' pacifismo estas ekzemple internaciaj arbitraciaj tribunaloj (Haag), Ligo de Nacioj kaj aliaj, pri kiuj oni povas legi en iu enciklopedio de l' pacifismo (germano en malnova provita „Handbuch der Friedensbewegung“ de Fried aŭ plej nova „Die Friedensbewegung“ de Lenz kaj Fabian, eldonejo Schwetschke, Berlin).

Post sia nesufiĉa — laŭ mia opinio — kritiko de la tri teorioj la aŭtoro alvenas al sia propra. Li eliras de ekzemplo: Du rusaj gubernioj neniam faros inter si militon, ĉar ekzistas super ili alia gubernio forta, kiu ilin malhelpas. Sekve „efektiva kaŭzo de militoj estas entenata en foresto de la tria supera potenco super apartaj regnoj“. La leganto miro, ke la aŭtoro tiun penson nomas nova. La ekzemplo estis tre ofte aplikata. Mi konas ĝin delonge el la germana pacifisma literaturo. Se la kontraŭulo dubas, ke ekzemple inter Germanujo kaj Francujo iam estos paco, oni lin memorigas pri la iama stato de Germanujo, kiam estis malfirma aro da kelkaj centoj de malgrandaj ŝtatoj kiuj intermilitis, kaj de kiuj hodiaŭ parte eĉ la limoj ne plu estas konataj. Krome se la aŭtoro aldonas, ke al la kondiĉo de ekzisto de supergubernio devas aliri tiu de sama lingvo, ankaŭ tiu opinio estas ofte elparolita inter pacifistoj, ĉefe inter pacifistaj esperantistoj.

(Daŭrigo sekvas.)

### Scienco.

Juro.

Radiotelegrafio en la germana juro.

Same kiel la pramaljunega revo de la homaro pri sendependa flugado, ankaŭ la deziro je senpera interŝanĝado de pensoj neĝenata per spaco kaj tempo incitis la penadojn de multaj jam de post longe tempo. Pro tio eĉ la misteraj spekulacioj de mesmerismo kaj spiritismo malgraŭ tiam da malsukcesoj kaj seniluziĝoj trovis ĉiam denove konfidemulojn kaj adeptojn eĉ inter la klerularo. Belege la angla fizikisto Ayrton en la naskighoro de sendrata telegrafo sciis esprimi ĉi tiun sopiron dormetantan profunde en la homa interno per la profetaj vortoj: „Jam alvenos tago — ni ĉiuj estos forgesitaj — je kiu kupraj dratoj, gutaperkaj kovraĵoj kaj bendferoj ripozos ankoraŭ nur en muzeoj; tiutempe la homido, kiu deziras interparoli kun la amiko kaj ne scias, kie li troviĝas, vokos per elektra voĉo, kiun aŭdos nur tiu, kiu posedas la orelon samagorditan. Li vokos: Kie vi estas? kaj eksonos en lia orelo la respondo: Mi estas en la profundego de minejo, sur la supro de Andoj aŭ sur la vasta oceano. Aŭ eble voĉo ne respondos kaj li ekscios, ke lia amiko mortis!

Eble ni hodiaŭ jam estus proksimaj al la plenumo de ĉi tiu revo, se la evoluo de nia scio pri la eco de elektra fluo estus irinta laŭlonge de la logike ĝusta vojo for de la konata eksperimento de Galvani pri ranfemuroj. Per Volta unue la kontinua fluo ĥemie produktata estis

servigata al la homaro kaj pro tio estis precipe ateniata kaj esplorata. Tiel fine la elektra signofarado per dratoj seninterrompaj kaj per kontinua fluo estis evoluigata duonon jarcenton pli frue ol la sendrata telegrafo per rapidaj alternfluoj, kvankam ĉi tiuj uzante ekzistantan, neelĉerpeblan naturforton kaj ĝin disŝprucigante ĉiufanken abunde en la eteron fakte estas la elementaĵo, la antaŭaĵo. La perdrata telegrafo, kiu laborante ekonomie kondukas nur malgrandegajn elektrerojn sur ebenigita vojo de loko al loko por tie ilin laborigi laŭ la volo de la sendinto, estas progresajo, duagradaĵo. Samkiel la fervojo ruliĝanta sur reĵoj estis enkondukata nur longe post sia antaŭulo, la sendepende movebla veturilo.

Precipe per ĉi tiu malrekta evoluo de la du sciigoj certe estas klarigeblaj la leĝodonaj malfacilaĵoj, kiujn oni renkontis kiam estis necese apliki la telegrafan regularon, ankaŭ por la sendrata telegrafo. La sciigo transdonita al la drato estas facile ŝirmebla kaj pro tio ĝia kontraŭjura forakceptado estas jure klare fiksebla. Alie ĉe la transigo per la etero oscilgata per alternaj fluoj multfrecvencaj. Kiel hipoteza mediuo ĝi ne estas kaptebla por la juro. La aero estas libera! La nuraj rajtoj, kiujn la ŝtatoj havas rilate al ĝi, estas tiuj, kiujn postulas la memkonservado. — Per ĉi tiu orakolo en 1906 la instituto por internacia juro sin elembrasigis ĉe la interkonsiladoj pri sendrata telegrafo en marmilito. Germanlando komprenis ĉi tiun verdikton je sia favoro kaj ŝanĝis en 1908 la leĝon pri telegrafajoj de la 6-a de aprilo 1898 jene: Elektraj telegrafaj instalaĵoj, kiuj sen metalaj interkomunikiloj peras sciigojn, estu establataj kaj praktikataj nur kun konsento de la imperio. Per tio oni starigis la imperian monopolon en la sendrata telegrafo ĉe pli severe ol en la drato. Kiu spite de tiu ordo starigas aŭ praktikas senkonsente instalaĵojn sendratan, ĝe se nur por la akceptado, estas punota. Eĉ jura eraro, ekz. se la farinto ne sciis, ke lia instalaĵo estas subigita al konsensio, ne ŝirmas. Sed nur la ĝisfine faritan agon, ne la agon nur komenciant minacas la leĝo. Perante ĉe nur ununuran sciigon oni jam praktikas punote.

Estas evidente, ke oni en Germanlando estas ankoraŭ malproksime de la idealstato tiom poezie penetrita de prof. Ayrton.

El „München Neueste Nachrichten“ 16. 12. 23. (Mallongigitle).  
D-o Fr. Fr.

## Statistiko.

La militoj de la lasta tempo kaj iliaj kostoj.

Certe estas interese scii, kiom da mono oni elspezis por militoj, kaŭzataj plej parte per la erarkompreno inter la popolo. Laŭ franca statistiko, uzanta tiucele materialon el plej certa fonto, la kostoj de la lastaj militoj prezentigas jene en milionoj da oraj frankoj:

Militoj de Napoleono I. 1795—1815	21000
Krimea milito 1854—56	8500
Milito en Italujo 1859	1265
Secesia milito 1861—65	18596
german-aŭstria 1866	1650
german-franca 1870—71	9820
rusa-turka 1877	6452
hispan-amerika 1898	5550
Bura milito 1899—1902	5699
rusa-japana 1904	10821

La kostoj de la rusa-japana milito ŝajnas esti ne tute precizaj. La kostojn de la mondilito oni kalkulas je 500 miliardoj da oraj frankoj; kompreneble entenas menciita sumo nur la kostojn por la rekta militado, ne la kromajn elspezojn.  
P. E. S., Bydgoszcz.

## Tekniko.

### Sireno-signaloj.

Ŝajnas ke la elektro okupas la tutan teritorion de la signaloj. Post la elektraj telegrafadoj kaj telefonadoj perferadaj kaj senferadaj oni komencas ĉiam pli uzi la elektron en la marborda signalado. La „nebultrumpetoj“, „vaporajfiloj“, „sonorilegoj“ estas ankoraŭ sufiĉe oftaj en la rivera kaj mara veturado sed la borda signalado ŝajne estas monopoligata de la alifrekvencaj sirenoj. La tono de la elektra sireno estas tiel karakteriza, ke ĝi ne povas esti intermiksata kun la sono de aliaj signaliloj (surŝipaj trumpetoj ktp.). La konstruado de tia sireno baziĝas sur akustikaj konoj; ĝi estas aparta fakto de la mekaniko.

La boneco de iu sireno dependas de la distanco, en kiu ĝi estas sufiĉe klare aŭdebla. La malgrandaj tipoj, kiuj servas nur por distancoj de unu kilometro, estas pelataj de elektromotoroj nome tiel ke la akso de la sireno estas rekte kulpita kun tiu de la motoro. Tio ŝajne estas la plej bona signalo sed bedaŭrinde ĝi ne estas ebla ĉe pli grandaj tipoj. Estas konate ke la rotacia periodo de elektromotoroj estas ĉ. 2800 ĝis 3000 po minuto, dum la periodo de sirenoj ofte superas 4000 turnoĝojn po minuto. Per la apliko de konusa ŝafto oni venkis ankaŭ tiun ĉi malfacilaĵon, kaj la modernaj signalstacioj nun ĉie estas ekipitaj per elektraj sirenoj.

J. M., Oldenburg.

## Elekto en la preĝejo.

En la S-ta. Thomas-preĝejo en Leipzig oni instalas antaŭ nelonge sonorilomaŝinon por kvar sonorilegoj. La mekanismo estas movigata kaj direktata per la urba triaxa alierna elektrofluo. La pezo de la bronza sonorilego estas 200 ĝis 5100 kilogramoj, sekve oni bezonis ĝis nun sep oficistojn por sonorigado. De nun tiuj oficistoj ne plu estas necesaj. Ankaŭ por la orgeno oni ĉiam pli kaj pli uzas elektrajn transmisiilojn.

J. M., Oldenburg.

## Internacia trafiko.

### Aerveturado.

#### Akcidento de aerŝipo.

Francaj gazetoj informas nun aŭtente, ke la Zeppelin-aerŝipo „Dixmuid“ (liverita de Germanujo al Francujo laŭ kondiĉoj de la kontrakto de Versailles) pereis laŭŝajne en la Mediteraneo. Oni trovis apud Sciaca (Sicilio) en la maro la mortan korpon de la komandanto de la aerŝipo. Kun grandaj ceremonioj oni kondukis ĝin al Napoli, de kie ĝi estas transportita al Toulon. Torpedo-ŝipoj forveurintaj de Bizerte (Tunizio) esploras la tutan sferon. Intertempe oni ankaŭ trovis pecojn da balonetsilko kaj dratojn de aparato por sendrata telegrafo, probable devenintaj de la aerŝipo.

R. Kr.

## Diversaĵoj.

### Disvastiĝo de aŭtomobiloj en Usono.

La valoro de aŭtomobiloj fabrikataj en Usono dum la nuna jaro estas pli ol tiu de iu alia usona industrio. Laŭ statistikoj de la registaro en Washington, la valoro de la aŭtomobiloj nunjare fabrikataj verŝajne estos pli ol tri miliardoj da dolaroj. Nuntempe ekzistas pli ol dektri milionoj da aŭtomobiloj; pli ol unu por ĉiu deko da enloĝantoj.

### La preserara diablo.

La „preserara diablo“ estas la plej timita diablo ĉe eldonistoj, aŭtoroj kaj korektistoj. Li nekomprenebligas aŭ alisencigas multajn vortojn aŭ ĉi tujajn frazojn. Kelkfoje tamen li ankaŭ efikas humoron kaj ridadon. Legante la presprovaĵojn de ET n-o 171, ni trovis diversajn tiajn ridigajn preserarojn. Jen ili:

Estas la antaŭvespero de krisnaska, festo familia, kiu postulas, ke ĉe hejma fajrujo aŭ ĉiuj familianoj. (En „Krisnaska antaŭvespero de kuracistoj“.)

Kun permeso de la aŭtoro tradukis el la es'ona lingvo grupo de Esperantistoj en Tallin. (En „La ekkulturisto“.)

La trifloj de l' salmo penetras en koron. (En „Motivoj de Sinaĵo“.)

## Kroniko.

Por servi nin legantarano per ĉiam aktuala, fidinda kaj kompleta informaro, ni bezonas sciigojn (sur poŝtkarto aŭ aparta folieto ulufanke skribita, sed ne inter administrat'oj privataj sciigoj) pri ĉiu novaĵo el la Esp. movado. Kondiĉoj: rapide, koncize, fidinde, legeble (precipe nomoj)

## Landoj.

### Aŭstrio.

Korneuburg. En nia urbo, lokita duonhoron de Wien, Esp. vivo denove komencis. La sukceso estis fondaĵo de „Esperanta Lluigo Korneuburg“, al kiu aliĝis tiuj pli ol 30 personoj. La estraro estas:

1. prez. inspektoro Hugo Steiner, 2. prez. kolonelo Hans Königbrunn, sekr. stud. jur. Matth. Alirichter, 2. sekr. Flino Margarethe Scheuringer, kas. instruistino Flino Antonia Bauer, bibliotekisto stud. gym. Franz Denk, 2. bibliotekisto redaktoro Hans Wiedemann, kaskontrolistoj Flino Herta Ullrich kaj s-o Franz Diewald.

Nia grupo volonte korespondos kun geeksterlandanoj. Oni skribu al s-o Hugo Steiner, Bisamberg 248 apud Wien, Aŭstrio.

### Bulgarujo.

Petriĉ. Je la 7. dec. nia junula grupo havis jarkunvenon, en kiu oni unuanime akceptis honore al via gazeto kiel nomon de la grupo la nomon de nia gazeto „Esperanto Triumfonta“. (Ni gratulas kaj dankas por la simpati-esprimo. Red.)

En la sama kunveno estas elektita nova komitato: sekr.-kas. Teodor K. Popov, bibliotekisto Timco Nikolov kaj help-komitataroj Goce Petrov kaj Konstantin Koccev.

S-ano T. K. Popov gvidas kurson laŭ la metodo de Ed. Privat kun 30 partoprenantoj. Kursanoj precipe gimnazianoj.

### Germanujo.

Soleno memoriga de la Loka Grupo Dresden okaze de la datreveno de l' naskiĝtago de nia Majstro estis vere inda kaj solena festo. Okaziginte la 15-an de dec. 1923 en la malnova salono de la delegitoj magistrataraj en Dresden-A, Landhausstr. 7, kie la dresdena esp-istaro kunvenas ĉiun lastan merkredon de la monato, ĝi kunigis ankaŭ tiun ĉi fojon centon da fevojaj ĝes'anoj, kiuj malgraŭ la mizeriga situacio en Germanujo ĝis nun ne perdis la kuraĝon, plubatali kontraŭ la obsolnaj baroj ĝis la fina venko.

Bele estis ornamitaj per laŭnaturgranda busto de Zamenhof, per faldigintaj standartoj kaj freŝa abia verdajo la estrara tablo. Post mallonga parolado la aŭstata prez. s-o J. Engst ĝoigis la aŭskultantarano per sia arta kaj sentplena violonludo, bone suitenata per s-ino S. Pezold per la fortepiano. Poste ankaŭ s-ino S. Pezold montris sian delikatan arton ludante kelkajn klasikajn muzikaĵojn.

La kulminacia punkto de la festo estis la forte impresiga parolado de la finlanda konsulo Karl von Frenckell, prezidinto de la XIV-a en Helsinki, pri la neelĉerpebla temo „Nia Majstro“, kiu finiĝis per la admono, ke ĉiu estu apostolo por la interna ideo de Esp.

Sekvis deklamo de Zamenhof-aj poemoj kun klarigoj de s-o G. Meves.

Denova violonludo de la prez. s-o J. Engst kaj kelkaj ĝisrevitaj paroloj finiĝis la oficialan parton de tiu impresiga soleno, al kiu sekvis ĝaja, senĝena kuneso en kafejo.

Wilt. Maier.

## Nederlando.

### Esperanto-festo en Amsterdam.

Dimanĉon la 20. jen je la 2a ĝis la 6a h. p.m. estos festo en la konstruaĵo l. O. F. Keizersgracht 480, Amsterdam, aranĝota de la Unua Amsterdama Societo Esperantista post la duonjara kunveno de „La Estonto Estas Nia“.

Komuna lunĉo (ne deviga) de la 1a ĝis la 2a h. okazos en la sama konstruaĵo.

Ĉiuj esp-istoj povos senpage partopreni la feston.

Venu kiel eble plej grandnombre.

### Polujo.

Lublin. Sabate la 15-an de dec. la lublina esp-istaro festis en sidejo de „Lublina Konsum Kooperativo“ naskiĝtagon de l' majstro (kunigita kun ekspozicio de esperantistoj). Post prelego de s-o J. Zavada „Pri vivo kaj agado de D-o L. L. Zamenhof“, plenumiĝis programo kiu konsistis el kantoj kaj deklamoj de jenaj personoj: del de LIEA s-o Cz. Pruski, s-o J. Zavada, Flino Silbergeld, s-o Stabczynski k. a. La festo havis grandan sukceson. M. Tuler.

### Rumanujo.

Bolgrad (Besarabia). S-o Eugenio Ivanov, del de LIEA, malfermis kurson kaj fervore propagandas por Espo. Bucuressti. En ŝtata liceo „Spiru Haret“ spec. kurso por 70 liceanoj.

Cernauii (ĉefurbo de Bukovino). La Berlitz lernejo dungis s-on majorono A. Hasenöhr, del de LIEA, kiel instruiston de Esp. kun monata salajro. La sama lernejo decidis doni atestejon al la personoj farintaj ekzamenon de Esp.

Ludosul-de-Mureŝ (Transilvanio). S-o Andreo Altesz, del de LIEA, malfermis la 6. dec. novan kurson por 12 partoprenantoj.

Turnu-Severin. Formiĝis grupo de esperantistoj. La gvidanto estas s-o S. Buclesu.

### Ruslando.

Nijnij-Novgorod. Okaze de la naskiĝtago de D-o Zamenhof, Esperanta Rondeto en Centra Laborista Klubo je nomo de k-do Sverdlov kune kun la ĉi tiea Esperanta Societo de SEU aranĝis la 17. dec. kunvenon en la ejo de la klubo. K-do Belevjev tralegis esperantlingve kun rusa traduko artikolon tiurilatan el la dec. n-o de „Sennnca Revuo“; k-do Konovalov faris raporton: „Biografia skizo pri D-o Zamenhof“; poste sekvis deklamo de kelkaj zamenhofaj versajoj.

La 28. nov. ĉi tieaj esp-istoj ĝuis la esp. radio-koncerton el Moskva en la ejo de la urba radio-stacio.

## Gazetoj.

Kurier Lodzki, Lodz, 8. 12. Pri valutoproblemo en Rusujo laŭ ET.

Republika, Lodz, 21. 12. Pri Irlando el esp. traduko.

New Jersey Post, Town of Union, 1. 12.

Noite, Rio de Janeiro, 30. 11. Pri L. d. N. kaj Esp.

Jornal do Brasil, 22. 11. Statistiko pri Eŭropo laŭ ET.

Kongresraporto de la komercaj asocioj de Brazilio, 1-a Kongreso 18. 10. — 15. 11. 1922. Detalaj artikoloj pri Esp. kaj Esp. en la komerco

Agrupacion Escultista, Barcelona, decembra kajero.

Narod, Split, 26. 11. — 31. 12. Kun regulaj notoj pri kaj el Esp.

Jutarnji List, Zagreb, 24. 12. Pri L. d. N. kaj Esp.

Het Vaderland, 28. 12. Anonco pri Esp. kurso.

Svoboda, Sofia, 3. 12. 9. 12. Kun pluraj artikoloj pri Esp., Zamenhof, internacia rilatoj kaj Esp. ktp.

Gazet van Leeuwen, 14. 12. Pri radioparolado en New Castle.

Le Petit Meridional, Montpellier, 17. 12. Pri Esp. en Francujo. — 24. 12. Pri dep. kongreso en Perpignan.

Le Cuir Illustré, Paris, 1. 1. Nova eldono de la konata Esp. uzanta leda gazeto

L'Indépendant, Perpignan, 2. 1. Esp. kaj komerco.

La Dépêche, Perpignan, 1. 1. Pri Amika Rondo.

Giornale di Reggio, Reggio-Emilia, 16. 12. Tuikolona artikolo pri Esp.

Reichenberger Zeitung, 15. 12. Pri Radio-parol. New Castle.

Monata raporto de la Gazetservo de la Hung. Esp. Instituto, novembro 1923.

Lj Nemzedék, Budapest, 5. 11. Esp. en Komitato de Popoligo.

Világ, Budapest, 4. 11. Pri Esp. kabaredo. Pri eldono de Hung. Esp. Aerŝiprafiko Sevilla—Buenos Aires laŭ ET.

Pesti Napló, Budapest, 6. 11. Granda artikolo pri la „parlamento“ de esp-istoj. (Konstanta reprezentantaro).

Magyarország, Budapest, 6. 11. Jarkunveno esp-ista.

Ĉiuj gazetoj en Budapest, 16. 11. Morto de D-o Giesswein. (Mencio de Esp. en Pesti Naplo, Az Ujság, Világ, Nemzeti Ujság.) — 20. 11. Enterigo de D-o Giesswein. (Mencio de Esp. paroladoj en A Reggel, Esti Kurir, Világ, Budapesti Hirlap, Pesti Napló, Pestier Lloyd, Népszava ktp.)

Echo du Danube, Budapest, 18. 11. Yokohama ne estas novkonstruota, laŭ ET.

Délmagyarország, Kaposvár, 6. 11. Landa Esp. Ekspozicio Kaposvár — 4. 11. Hamburg-Amerika Linio 75-jara, laŭ ET.

ET. Esp. jarkunveno en Budapest, — 8. 11. Esp. jarkunveno en Budapest, — 10. 11. Aerservo Sevilla—Buenos Aires laŭ ET. — 11. 11. Nova insulo en Kaspi-marjo laŭ ET. 14. 11. Radio-parolado de Merchant laŭ ET. — 23. 11. Esp. policista kongreso en Wien. — 25. 11. Esp. instruado en Ĉeĥoslovakio laŭ ET.

(El aliaj provincaj urboj kaj pri aliaj ĵurnaloj mankas sciigoj.) La fakto laboras en Budapest kaj 8 provincaj urboj.)

Paŭlo Balkanyi.

## Esperanto por la blinduloj: fakto!

En Budapest oni ludas novan dramon de hungara verkisto Hugo Csereĝo: „La unua tagiĝo“, kiu prezentas la vivon de blinduloj en la instituto. La verkisto antaŭe zorge esploris la vivon en la blindulinstitutoj de Budapest kaj donis vere realan bildon pri tio. Kaj jen la blinduloj rakontas, ke ili havas eĉ gazeton en esperanta lingvo kaj unu vivante portas al ili por legado esperantan tradukon de Shakespeare. En la vivo de la blinduloj lia lingvo do estas memkomprenebla kaj ĉiu ekstera rigardanto devas konsigli pri tio, observante ilian vivon, ke por ili Esperanto farigis jam reala fakto. La proporcio de la nombro de nevidantaj esperantistoj al la nombro de la blinduloj en la tuta mondo estas tre granda. Multege pli granda ol la nombro de la vidantaj esperantistoj kompare al la nombro de la loĝantaro de l' mondo. Per penega laboro kelkaj idealistoj per Esperanto havigis al tiu ĉi aparta popolo praktikan ilon. Ni povas lerni de ili!



Studa ĥoro de Latva Kulturakela Societo (dua Esperanto-ĥoro en Latvio) sub gvidado de or-direktoro H. Prusis

## Latva ĥorkanto.

En lasta tempo latva ĥorkanto ludas pli kaj pli gravan rolon en la artovivo de Latvio. Por alkonduki la kantoĥoron al perfekteco latva ĥorestro H. Prusis fondis la 5. oktobro 1922 „Stud-ejon de Muziko” kun speciala klaso por ĥorkanto.

En tiu ĉi klaso oni instruas al la disĉiploj de muziko perfektigon de aŭdokapablo, voĉformigon, teknikon de elparolo, deklamacion, teorion de muziko, kronometrion, ritimikon, ludon de fortepiano, esperantan kaj italan lingvojn kaj enhoran kanton. Al tiuj, kiuj deziras fariĝi dramaj aŭ operaj ĥoranoj, oni instruas ankaŭ la aranĝon de scenejo. Instruas konataj muzikaj pedagogoj-aŭtistoj. La ĥoro post jaro de sistema laboro montris bonajn sukcesojn kaj samtempe vidigis ke nur sisteme studante kaj pliklerigante ĉiujn ĥoranojn estas eble atingi la plej altan nivelon de l' ĥora kanto.

La ĥoro kun granda sukceso aranĝis kelkajn koncertojn kaj la 27. oktobro 1923 partoprenis en Koncert-Vespero de Riga Esperanto Societo kun Esperanto-repertuaro.

La ĥorestro s-o H. Prusis finis la Muzikan Altlernejon, kaj estis gvidanto de teatra ĥoro kaj orkestro, kaj muzika pedagogo. Li ĉiam estis serĉinta novajn vojojn en la muziko.

La ĥoro, gvidata de la nelacigebla ĥorestro, daŭrigas sian laboron kaj intencas viziti unu el sekvontaj Esperanto-kongresoj.

La senĉesa klopodado de la ĥor-direktanto certigas ĉiam pli grandigan famon al la ĥoro. La enpresata bildo montras la ĥoron dum unu el ĝiaj lastaj prezentadoj. I. H. Čače, Riga.

La nova dramo cetere ankaŭ montras, ke la mondo de blinduloj estas aparta mondo — ofte pli bela ol la videbla! Ili vivas modeste, sed tre intense pensante kaj profundanime kaj escepte novblindigitaj ili tute ne estas malgajaj. Kelkajn eĉ amo kaj feliĉa esontico atendas. Tiam okazas la uragano. Flirtanta vidanta knabino ludas kun blinda junulo volante, ke ankaŭ tiu adoru ŝin, kiel la vidantulo faras. Kaj venas kuracisto, kiu eltrovis kuracilon, kiu redonas vidon. La kuracilo estas ne taŭga, ĝi redonas la vidon por mallonga tempo, sed povas semtempe mortigi la homon. La direktoro do ne volas fari eksperimentojn. Sed la blinduloj hazarde ekkaptas la provtubetojn kaj du el ili mem faras la eksperimenton. Unu el ili vidas por mallonga tempo la belecon de la vivo — kaj la senkorecon kaj malgrandanimojn de la vidantoj — la alia mortas. La kuracisto mem mortigas sin kaj nenigas la kuracilon pro nekonsidera eksperimento. La junulo restinta en vivo feliĉe reiras al sia blinda fianĉino. La blinduloj ree trankviligas kaj ĝojas vivi en sia blindeco, en kiu ili vivas pli trankvile, vidas pli profunden, sentas pli pure, ol la ne kriplaj vidantoj. Ni devas ankoraŭ menciigi, ke la aktoroj ludas vere majstre la malfacilan kaj dolorigan rolon de blinduloj.

P. B.

## Esperanta etimologio.

De D-ro Vilmos Aŭsterliĥ en Bardio.

Lastempe en ET ofte aperis artikoloj, pritaktantaj la devenon de diversaj esperantaj vortoj kaj sufiksoj. Mi atentigas la intereseulojn, ke ekzistas bona verketo de „Louis Bastien”, titolata: „Naŭlingva etimologia leksikono de la lingvo Esperanto”, (Paris, Presa Esperantista Societo, 55, Rue Lacépède), kiu ampleksas preskaŭ la tutan oficialan, esperantan radikon kun aldone de la samsonaj aŭ simisionaj esprimoj en la lingvoj: latina, franca, itala, hispana, portugala, germana, angla kaj rusa.

Bedaŭrinde mankas tamen la prepozicioj, pronomoj, adverboj, ĉiuj prefiksoj kaj afiksoj. Spite tion, la verko estas bone uzbla kaj donas utilajn klarigojn rilate la devenon de plej multaj Esperantaj vortoj.

La devenon de la plej uzataj prefiksoj kaj afiksoj ni esperis jene:

-ek: greka deveno. Komparu: fajno = montri; ekfajno = ekmontri.  
-bo: franca. Komp.: beaufrère = bofrato.  
-ge: latina, germana. Komp.: geminare (latina) = duobligi. Geschwister (germ.) = gefratoj.  
-mal: franca, angla, itala, hispana. Komp.: malcontent (angl.), malcontento (itala) = malkontenta. — Malheureux (franc.) = malfeliĉa. — Malaventurado (hisp.) = malfeliĉa.

-et: franca, angla, itala. Komp.: tablette (franca), tablet (angl.) = tableto. — Parolita (ital.) = paroleto. — et: itala. — Komp.: Testa, testaccia (elparolo: testaĉa) = kapo, kapeto.

-ad: franca. Komp.: bloquade = blokado.  
-ig: germana. Befriedigen = kontentigi.  
-ig: pola (?). Komp.: Mocny, mocniec = forta, fo-tigi.

-abl: latina, franca, angla. Komp.: spectabilis (latina) = videbla. — croyable (franca) = kredibla; readable (elp. ridadebl) = legebla.

-am: franca. Komp.: aimer (elp. eme) = ami.  
-eg: ukraina (?). Komp.: slodij, slodjuga = ŝtelisto, ŝtelegisto; — aŭ: drab, drabuga = fripono, friponego.  
-ist: grekolestina, internacia. Komp.: sofistēs, (grek.) = filozofa, artisto; aŭ artist, deist, dentist, nihilist ktp. (en ĉiuj lingvoj).

-an: latina, internacia. Komp.: Romanus, christianus lutheranus, respublikanus ktp.  
-in: latina, germana kaj romanaj lingvoj. Komp.: Agrippa — Arippina (lat.); roi — reine (franc.); König — Königin (germ.); king — queen (elp.; kün; angl.) = reĝo — regino.

-id: greka. Komp.: Canaides = posteuloj de Danaos, Danaidoj.  
-ul: latina. Komp.: ullus = iu; nullus = neniu; famulus = servo; Romulus, Datullus, Tibullus ktp.

-aj: franca. Komp.: Griller — grillage (elp.: griĝaj) = rostii — rostajo.

-il: rusa, hispana, internacia. Komp.: martillo (hisp.) = marteilo; cuchillo (hisp.) = iranĉito; tornillo (hisp.) = ŝraŭbo. — Mijl — milo (ruse) = lavi; — sapoj — ŝiĝ — ŝilo (ruse) = kudri — kudrilo. (Salicil, ventil, fenil, karbil, kakodil ktp.)

-er: latina. Komp.: Antiquarium; Inventarium. Seminarium ktp.  
-ec: itala. Komp.: gentile — gentilezza (itala) = gentila — gentileco.

-ĉjo, -ĵjo: slava, hungara. Komp.: Karel — Karliĉek (ĉeĥa) || Karlo — Keĉjo; János (elp.: Janoš) — Jancsi (elp. Janŝi) (hung.) = Johano — Joĉjo. Mama — maminja (ukraina) = patrino — panjo. Sofia — ŝonja (ruse) = Sofio — Sonjo.

-er: ?? germana? Komp.: Holz = ligno; Hölzerl = ligneto, lignero.  
-um: germana? latina? Komp.: Um, herum (germ.), circum (latina) = ĉirkaŭ. (Kolomo, manumo, buŝumo ktp. estante ĉirkaŭ la kolo ktp.)

Mi estus tre dankema al la diverslingvaj samideanoj, se ili bonvolus komuniki kelkajn klarigajn notojn rilate la ĉi supran liston.

## Bibliografio.

### Libroj.

Die Verhältnismörter des Esperanto. (La prepozicioj de Esperanto.) De Eugen Wüster. 56 pg. kaj kovrilo. Esp.-Verlag Ellersiek & Borel, Berlin kaj Dresden. Prezo 1,25 gm.

La germanlingva broŝuro enhavas elfundan sciencan studon pri la prepozicioj de Esp. kaj prezentas samtempe ĝeneralan instruon pri la funkciado de la prepozicioj en la originalaj lingvoj de Esp. Kelkaj tabeloj ilustras la tekston. Kvankam la aŭtoro liveris en la libreto diligentan laboron kaj uzis plejble klaran esprimmanieron, tamen nur instruita persono plene komprenos ĝin. Al mi ne plaĉas, ke la aŭtoro uzas por la gramatikaj elementoj alterne la konvencian latindevenajn kaj la novajn germanajn signifojn: Präposition kaj Verhältnismörter, Adverb kaj Umstandsörter, Substantiv kaj Hauptwörter ktp. Por facila kompreno estas preferinde uzi nur unu el ambaŭ formoj. Cetere, la broŝuro estas denove la precizecon kaj fidindecon de la laboro de s-o Wüster. Laŭdira estas ankaŭ la modela aranĝo de la broŝuro kaj la bona preso. T. J.

Dokumentoj de Komunismo. Esperantigis D-o Emil Pfeffer, kun komplemento tradukita de G. Rozenblat. Eld. Sennacia Asocio Tutmonda. 12×18 cm, 181 pg. kun du portretoj ktp.

Tiu, kiu ekkonas la necesojn de l' vivo, komprenos, ke nenio povas pli utili al nia afero ol la verkado aŭ traduko de praktikaj verkoj. La „dokumentoj” estas unu el la unuaj provoj disvastigi laboristan socialistan literaturon pere de Esp. Oni povas ĝoĝi pri la iniciato kaj la atingita sukceso. La libro estas tre irafe aranĝita, preso kaj paŝero estas bonaj. La traduko estas bona. Mi tamen ŝatus kelkloke pli fluajn, pli gletajn lingvaĵojn, kian oni ĝenerale kuŝmas esti de konata verkisto fiel D-o Pfeffer. Evidente la libro estas tre rapide prilaborita. Al flanko ĝi ankaŭ vidigas, ke oni devas ankoraŭ multe pli uzadi kaj elprovi la lingvon de l' praktika vivo. Ne konsiderante la tendencojn mem oni eblas tamen tre rekomendi la aŭtoron de la libro. R. Kr.

Por la neutralismo! 2a eldono. Sennacia Asocio Tutmonda. Admin. Colmsir. 1, III Leipzig 12×18,5, 22 pg. Bonaspekta represo de la 1a eldono. Tiu, kiu konas la nomon de la aŭtoro E. Lanly, ne bezonos spec. informon pri la bonaj rezonoj pri la prikrakita temo.

Gvidfolio tra la urbo Bratislava, 11,5×15,5, 4 pg. Laŭ konata modelo.

Zorgegu pri la infanoj, 4a eldono, 15×19 cm, eld. J. Bredál, 5 Birdhurst Rd., Croydon, Anglujo. Flugfolio por protekto de infanoj kontraŭ alkoholo.

Radio and the Language difficulty, London 1923, 12×18 cm. Pri la rolo de Esp. en la radio-servo, de 7 pg. H. A. Epton.

Bonega propagandilo por angloj. Havebla de BEA, 17 Hart Street, London W. C. 1. H. R.

Penseroj, dua kajero, de Salo-Grenkamp-Kornfeld. Eldonejo: Esp-ista Voĉo, Jaslo 1924. 11×15 cm, 46 pg. Ankaŭ la dua kajero de tiu serio estas riĉenhava kolekto de proverboj, sentencoj, aliorismoj ktp. La traduko estas same bona kiel tiu de la unua kajero kaj rekomendata al ĉiu. R. Kr.

La malbela anasido, eldono B. E. A. London. 8,5×11,5, 12 pg. Prezo 1 penco.

Eia legolibreto, enhavo konata el la antaŭmilitaj Ĉeĉoslojloj.

Jarlibro 1923 de Japana Esp. Instituto, Uŝigome, Tokio. 15×25 cm. 52 pg.

Tre bonaspekta broŝuro en jap. lingvo, certe tre interesa por japanoj; libro kun 7 sigeloj por ne-japanoj. La amplekso tamen montras al ni la aktivecon de niaj japanaj s-anoj. R. Kr.

Tra la Franciskana urbo Assisi. Ilustrita gvidlibreto de P. Stefano de Carolis, O.F.M. Eldonis A. Paolet, S. Vito al Tagliamento. 12×17 cm 35 pg.

Tre interesa kaj riĉe ilustrita gvidlibreto, kies aĉeton oni nepre devas rekomendi al vojaĝemuloj kaj interesatoj pri historio kaj geografio.

Manuale di Esperanto in dieci lezioni, D-o B. Migliorini, lernolibro itala kun du vortolistoj, Eldonis A. Paolet, S. Vito al Tagliamento, 11,5×17, 127 pg.

Bonega pliriĉigo de la itala esp. libraro. La trege bone prilaborita libro, dividita en 10 lecionoj, detala antaŭparolo, multaj klarigoj, ekzemploj, modeloj ktp., certe helpos verbi multajn adepojn al nia lingvo. Preso kaj aranĝo bonaj. Oni devas gratuli la aŭtoron. Alberti.

### Gazetoj.

La Verda Ombro, oki. La Movado, dec. L'Antifascionaliste, Paris XX. Nova gazeto en franca lingvo por la propagando de Esperanto en la proletara medio. Movado, Esperanto-informilo pri Finlando, respondeca redaktoro Alb. Sandström. Nova finlanda gazeto por anstataŭi la malaperintan „Esperanto Finnlando”.

La France Postale Esperantiste, Paris, julio-okt. Kataluna Esperantisto, Barcelona, aŭg.-sept. Revuo Orienta, Tokio, n-o 11 kaj 12, nov.

Svenska Arbetar Esperantisten, Göteborg, nov. Esperantista Junularo, Baugé, nov.-dec. Amerika Esperantisto, Boston, nov. Lumturo, Bremen, 15. 11.

La Suda Kruco, Melbourne, n-o 41, nov. Corriere Balcanico, Bari, nov. Esperantsky Zpravodaj, Praha, dec. La Progreso, Praha, dec.

Marto, Haida, 20. 12. France Esperanto, Paris, dec. La Interligilo de l' P.T.T., dec. The British Esperantist, London, dec.

Itala Esperanta Revuo, S. Vito al Tagliamento, dec. Holanda Esperantisto, Zutphen, 102—104. Bulgara Esperantisto, Sofia, dec.

Informo de Esp. Asocio de Estonio, Tallinn, dec. Esperanta Ligilo, Stockholm, dec. Germana Esperantisto, Berlin, dec. Esperantio, Berlin-Charlottenburg, n-oj 1—4. Literatura Mondo, Budapeŝt, dec. Mondo (en ido), dec.

### K. R.

(Kelkaj vortoj pri la aŭtoro de „La Reĝo de Judeo.”) Recenzante la ĵus reeldonitan dramon „La Reĝo de Judeo” (ET 160), s-o G. Ajul estis prave mirigita ke la eldonisto ne malkaŝis la nomon de l' verkinto. Mia opinio la diskreteco estas senintena, ĉar la aŭtoro estis konata en Rusujo kutime (amenaŭ oficiale) nur kiel pseudonimo.

La konata talenta poeto, samtempe kompetenta artamanto, estis grandduko Konstantin Romanov, por sia intelekto kaj klereco sola inter familianoj de la estinta dinastio. La verkaro de K. R. estas sufiĉe granda. Liaj verkoj estis eldonitaj en 1889 kaj 1899. (Novaj versajoj de K. R.) Krome multaj versajoj estis presitaj en diversaj revuoj kaj eĉ tradukitaj alilingvaj, ekz. en la italan. K. R. naskigis en 1858; en 1899 li estis elektita kiel prezidanto de la Scienca Akademio kaj en 1900 — honora akademiano. Li mortis en la komenco de la modifadilo, baldaŭ post la morto de sia filo porcinde en la batalo.

Rilate dramon — „La Reĝo de Judeo” estis dum kara reĝimo nenie publike prezentita krom en la infima kortega teatro ĉe la Vintra Palaco en Peterburgo. La aktoraro estis alrangaj amatoroj. R. Lorentson.

### Preseraroj.

Vojaĝinte al Berlin la ĉefredaktoro ne povis legi la presprovaĵon de ET n-o 173, kiu pro tio enhavas nekutime multajn preserarojn, precipe en la felietono „Preskaŭ vera okazintaĵo”. La plej gravajn preserarojn ni korektas ĉi tie:

Pg. 2, kol. 5. Scienco, Medicino, lin. 5, legu en anst. ne. En la felietono pg. 2, kol. 1, lin. 7, legu tiu anst. tio, lin. 25 diskuris anst. diskutis, kol. 5, lin. 21 ni anst. mi, lin. 52 Tintante anst. Tiutante. — Pg. 3, kol. 1, lin. 15 kaj 20 senharajo(n) anst. senhavaĵo(n), lin. 24 estus kompatinde anst. estas kompatinga, lin. 29 traktan anst. taktan, lin. 28 ĉu anst. ĉiu; kol. 2, lin. 1 memofero anst. memofermo, lin. 11 stacidomo anst. stacidono. — En la postskribo sur la sama kolono, lin. 6, legu la anst. ja.

Libera tribuno.

Sub tiu ĉi rubriko laŭ disponebla loko estas lojale enpresataj ĉiuj sciigoj, informoj, kritikoj, liberalaj vortoj ktp. La redakcio tamen en prenas sur sin ĉiun respondecon pri la enhavo, sed ĉi rezervas al si la rajton eventuale rifuzi netaĝajn artikolojn.

250. Konservado de Esp. per gramofondiskoj.

Leginte en n-ro 161 de ET la interesan artikolon „Konservado de Esp. paroloj per gramofondiskoj“ de s-ano W. R. Wood, Torquay (Anglujo), mi traserĉis malnovajn esperantajn kaj trovi malnovan flugilon de la Akcia Societo por Instruiloj, Berlin W 62, Kleidstr. 17: „La belecon de Esperanto vi bonege ekkonos per la lingvo-instrua aparato de la Akcia Societo por Instruiloj. Jen 3 modelaj recitajoj en Esperanto:

- 1. Monologo el „Hamleto“ parolita de Emanuel Reicher, la fama aranĝinto de la lĝenio-prezentado en la Kongreso de Dresden 1908.
2. Tri poemoj, parolataj de L. Schiff:
a) La Espero
b) En Songo (de Heine)
c) La Kapelo (de Uhland)
3. Alveno de franco en rusa hotelo kun germana portisto. Interparolo inter tri diversnaciaj.

251. Ril. al 222.

Trege surprizite kaj mirigite mi legis en la „Parolejo“ 222 en n-ro 162, „ke nia maistro ĉerpis la sukcon -aĉ- ktp.“ Ĉu ne estas ĝenerale konata inter la esp-istaro, ke la sukco -aĉ- devenas ne de nia maistro D-o Zamenhof, sed de la morfina famekonata franca universitata rektoro Prof. D-o Boirac, kiu pro tiu sukco -aĉ- serce estas nomita „Boirac“? Homfrato, Wien.

Ĉu ni pensas en lingvo?

Mi estas konvinkita, ke ni pensas en bildoj kaj imagoj. — La pensado okazas tiel rapidege, ke ne estas eble pensi en vortoj. Parolante ni devas tuj trovi al la bildoj kaj imagoj la vortojn en la lingvo, kiun ni ĝuste parolas. Tial en la esp. lingvo ni pli rapide lernas paroli, ĉar en Esp. ni konstruas la vortojn laŭ la pensadobildo el la radikoj; la vortaro, el kiu ni konstruas la frazojn, estas multe pli malgranda ol la vortaro de la popollingvoj. — Oni diros, kial mi demandas, se mi scias kiel ni pensas. Nu, mi havas la senton, ke mi scias, sed mi dezirus aŭdi la klarigon de fakpsikologiisto pri la afero. Ĉar tro ofte oni devas aŭdi la klarigon: Se oni volas flue paroli, oni devas pensi en la lingvo! Eĉ en la alvoko de la konferencanoj en Geneve, subskribita de instruistoj el la tuta mondo, oni povas legi sur la unua paĝo, 8. linio de mal-supre: „Esperanto plifaciligas la pensadon en fremda lingvo.“ Zanonj diras en la traktajo: „Kiel akiri bonan silon?“ sur paĝo 8, 7. linio de supre: „Per tio vi lernas pensi en nia lingvo.“ — Sekve estus tre necese, klarigi la aferon, ĉar multaj kleruloj kredas, ke oni pensas en lingvo. — Mi enmetis la demandojn jam en alian gazeton, sed ĝis hodiaŭ ne alvenis respondo. Legontoj, helpu serĉi fakulon pro klarigo de la demando. R. v. Lidl Fohnsdorf (Aŭstrio).

10 paĝojn povus ampleksi ET, se ĉiu nuna abonanto nur varbos unu novan!

Prezo-redukto! Favorprezoj por libroj. Taglibro de vilaĝpedelo Malriĉa en spirito. Ĉiu libro kostas provizore nur 0.60 sv. fk. aŭ 0.50 or-mk. inkluzive sendkostoj. Skribu tuj al Butin & Jung, G. m. b. H. Godesberg (Germ.) Bahnhofstr. 30.

Baldaŭ aperos Eŭropo ĉe la abismo de Francesco Nitti lama ministrara prezidanto itala Esperanto-traduko kun speciala antaŭparolo de la eminenta aŭtoro. Petu prospektojn kaj detalojn kaj sendu antaŭmendojn je favorprezo al Frankf. Societĉats-Druckerei G. m. b. H., Abteilung Buchverlag, Frankfurt a. M. Korespondado en Esperanto. - Ilustr. kartoj rifuzotaj.

El mia biblioteko vi povas aĉeti la plej rekomendindajn Esperanto-verkojn: ie malalte prezoj. Mi konsentas rabaton kaj partopagon kaj sendas sortimentojn. Postulu liston: Guido Otto, direktoro de la Esp. lernejo P l a u e n l. V., Goethestr. 105.

„La internacia poŝtradukisto“ Gvidilo kaj vortaro en 11 lingvoj kun parto en Esperanto. Por ĉiu poŝtisto. Por ĉiu komercisto. Por ĉiu korespondemulo. Prezo nur 6 fr. fk. plus afranko. Skribu tuj al Eldonejo de „Esperanto Triumfonta“ Horrem b. Köln.

Grupo esp. ĉe politeknika lernejo, por pravi al inĝenieroj instruistoj kaj studentoj praktikajn uilecon de nia lingvo, deziras korespondadi kun apartaj esp-istoj, rondetoj, societoj de ĉiuj landoj pri sciencaj, politikaj k. a. temoj; interŝangi per l. pk. kun vidoj de politeknikaj lernejoj, universitatoj, maŝinoj, konstruaĵoj, famaj scienculoj, verkistoj ktp. Ĉiam akurate respondas. Adreso: Ruslando (Siberio), Urbo Ĉita, Uss-wyiska ul., Politeknikum, Rondeto Esperantista al Pet. Meŝĉerjakov.

Ĉiu literaturamanto propagandisto serioza esp-isto abonu la revuon: Literatura Mondo Budapest VI, Andrassy ut. 81.

Malaltigo de prezoj. Por akceli la disvastigon de niaj bonstilaĵoj libroj ni fiksis ĝis-plue prefer-prezojn. Bukedo, 1. volumo 0.60 sv. fk. aŭ Malriĉa en spirito 0.50 ormarkoj Bialystok 0.50 sv. fk. aŭ Albano 0.25 ormarkoj inkluzive sendkostoj. Utiligu la favoran okazon! — Mendu tuj ĉe Eldonejo de „Esperanto Triumfonta“ Horrem b. Köln (Germanujo).

Anoncetoj. Anoncetoj pri esperantista vivo (naskiĝo, fianĉiĝo, edziĝo, morto, okazantaĵoj gravaj esp. kunveno, festoj k. s.) senpaĝe. Aliaj anoncetoj, nur akceptataj por minimume du sinsekvaj enpresoj, kosta po du enpresoj kaj 20 vortoj (krom unu adreso) la prezon de ok ET-numeroj kontraŭ antaŭa pago. Abonantoj, ĉe kiuj ni povas depremi la pagon de la abonkonto, ĝuas por propra anoncetoj preferan prezon de kvin ET-numeroj. Germanoj pagas 2 — mk., prefera prezo por poŝtabonantoj 1.25 mk. Anoncetoj devas alveni 12 tagojn antaŭ publikigo. EDZIĜO. Kasisto de Kazana societo esp. Mikaelo Smirnov (poŝtistico) kun sekretariino de la sama societo f-lino Augusta Freiberg. S-o P. Medem, Kaunas forveturas, kaj petas prokrasti la korespondadon ĝis la 15a de Januaro. [1]

FARMACISTOJ! Tuj ni eldonos la gazeton „Farmacio kaj Hemio“. Bonvolu sendi al ni vian manuskripto. Spciale junaj farmaciaj studentoj de la tuta mondo helpu nin! Jarabono 4 respondakupojn. Esp. grupo en Tojama, farmacia kolegio, (reprezentanto s-o Tsuneshigo Matsumoto), Tojama, Japanujo. Ni korespondas pri ĉiuj temoj kun ĉiu samideano. [2]

„La kvinjaro de Sovetlando“—luka albombibro pri Kvinjara ekzistado de la Sovietaj Respublikoj. 80-paĝa, 70 ilustraĵoj. Trad. V. Polakov, Aĉetbla ĉe Centra Komitato de Sovetlanda Esperantista Unuiĝo (Moskva-Rusujo, PK No. 650). Prezo por malbonval. 1 sv. frk., mezval. 2 sv. frk., bonval. 3 sv. frk. Por afranko oni aldonu 100%. La libro estas sendata post antaŭpago per monbiletoj stabilvalutaj en rekomenditaj leteroj. [4]

HELPU NIN, gesamideanoj tutmondaj! Por ke ni povu sukcesplene aranĝi ekspozicion propagandan kaj por ke ni povu ornami nian novan klubojn, ni petas ĉiujn eldonejojn, redakciojn, grupojn kaj apartajn esperantistojn sendi al ni kiajn ajn esperantajjn Koran antaŭdankon. Esperanto-grupo, s-o D. Tuĝarov, Ferdinand 26, T-Pazarĝik, Bulgarujo. [2]

ESPERANTA MIGRANTA BIBLIOTEKO liveras al rusaj samideanoj plej abundan legmaterian. Petu informon de s-o K. Kolobaŝkin, Volove — Livenskioje, gub. de Orel, 5 Lomigory, aŭ de s-o I. Sirjaev, Baklanka, gub. de Volgods. Por respondo nepe aldonu pm. [1]

Korespondado kaj Interŝango.

Pastroj atentu! Pastroj A. J. Ashley, The Vicarage, Farnley Tyas apud Huddersfield, Anglujo, deziras interŝanĝi kun pastroj de ĉiuj landoj kaj komunumo. [2] Hans Dahmen, instruisto, Horrem b. Köln, Germ., deziras korespondadon per l. kaj interŝangas pk il. (bfl.). Ne kolektas markojn. [2]

F-lino Jolano Steiner, studentino, Pécs, Légeszeszqyar-u. 5, Hungarujo, deziras korespondi pri filozofio, literaturo nur kun studentoj. [2] S-o Viktoro Balaza, denturacisto, deziras korespondi kun la tuta mondo. Adreso: Pécs, Rakoczy 35. Hung. [2]

Por 1 dolaro mi donas 50—100 pm. (ne-kaj stampitajn). Registrigu vian sendaĵon. S-o Hans Wolffschmitt, München, Klenzestr. 99, l. [2]

Fraŭlo Miguel E. Castaneda, str. Belgrano 825, Buenos Aires, R. A., deziras korespondi kun gesamideanoj ĉiujlandaj per l. il. pk. (bfl.), pri nacia vivo kaj iuj aliaj temoj, interŝanĝi intern. revuojn, naciajn kaj esp. Mi ĉiam respondas. [2]

S-o Szymon Rubinstein, Lubelska 25, Radom, Polujo, interŝangas pm., papermonojn. Mi havas malnovajn pm. de Polujo. [2] Grupo de metalistoj kaj petrolmineistoj volas korespondi per l. kaj il. pk. Ni respondas al ĉiuj. S-o B. Cechowski, Borislav, Polujo. [2]

Filatelistoj! Por 5 sv. fk. aŭ egalvaloro mi sendas 50 div. pm. de 1 miliono ĝis 50 milardoj kaj 10 vera malofitoj, por 4 sv. fk. 10 malnovajn pm. el jaro 1870. Ankaŭ interŝangas pm., sed nur malnovajn kaj malofitojn. S-o Otto Dietrich, Fürstenu 50, Post Lauenstein (Sa.) Germ. [2]

F-lino Rur Holmberg, Vestra Kattari, Malmö 7, Svedujo, bedaŭras, ke ŝi ne povas respondi al ĉiuj, kaŭze de la amaso da ricevitaj korespondadoj. [2] S-o Eug. Maeschalk, rue Julius De Geyter 65, Antwerpen, Belgujo, deziras korespondi per l. kaj il. pk. kun gesanoj de la tuta mondo. [2]

S-o Anatoli Zdancko, Studencka 3, Nieswicz, Polujo, deziras interŝanĝi pm. kun la tuta mondo. [2] S-o Stefano Janits, ledfabrika magazeno, Nové-Zamky, ledfabriko, Ĉeĥoslovakio, deziras korespondi kun ledfabrikaj laboristoj de la tuta mondo. [2]

S-o Tsuneshigo Matsumoto, ĉe Tojama Farmacia Kolegio, Tojama, Japanujo, deziras interŝanĝi l. pk. il. gazetojn, fotoĝrafiajn, esperantajn, fungojn, desegnaĵojn de geknaboj kun ĉiuj landoj. [2] S-o Hans Stalling, stud., „Hotel Elektra“ en Zell am See (Aŭstrio) kaj 15 gekursanoj deziras korespondi per il. pk. (bfl.) kaj l. kun ĉiuj landoj. Respondas almenaŭ unufoje. [2]

Juna fraŭlino deziras korespondadi kun aliaj landoj kaj interŝanĝi pm. monerojn il. Pk. A. Röttschke, Trautenau, Kirchenlaube, Ĉeĥos. [1] Fraŭlo 20 jara deziras korespondi per il. Pk. kaj l. kun gesamideanoj de la tuta mondo. Precipe fraŭlinoj. Respondas tuta certe. Alfred Zenigraf, Luisenstr. 2 Meiningen, Germanujo. [1]

Kelkaj el miaj lernantoj deziras interŝanĝi pm. kun ĉiuj eksterŝtataj ŝtatoj. Ili sendos kvanton kontraŭ kvanto Adresu al Del. UEA: s-o Swinkels, Daurie, Nederlando Hageind 244, kiu garantias tujan respondon. [1] Du amikoj Esperantistoj V. Russe kaj R. Caruso deziras korespondadi per il. Pk. kaj l. kun eŭropaj, amerikaj kaj azaj gesamideanoj. Adreso: s-o Rino Caruso, Via Francesco Crispi 252, Catania, Italujo. [1]

S-o Samuelo Samuel, Universitata 5, Ĉiuj, Rumanujo, interŝangas serioze, il. Pk. kaj l. kun ĉiuj landoj. Interŝangas ankaŭ pm., escepte kun Germanujo. Nepe ĉion respondas. [1] Mi volas korespondi kun junaj socialistoj, kun futabstinentuloj (i. O. G. T.) kaj ricevi librojn pri popolaj dancoj (kun muziko.) Mi rekompencas se estas bone. Adreso: gvidanto grupa, s-o Dolf van Wesemael, Socialistische Jonge Wacht, Heernisla, 27, Heernislaent Genl, (Vlanderen, Belgujo. [1]

Fraŭlo Wolckmar Hiemesch Rahmeng, 18 Brašov, Rumanujo, korespondadus volonte per il. Pk. kun ĉiuj landoj. [1] S-o Desbrosses, profesoro, Montargis (Loiret), Francujo, deziras interŝanĝi pm. kun ĉiuj landoj; ne sendas unue, sed ĉiam respondas. [1]

S-o Misloslav Némec Palackého 40, Kyjovna Moravé, bankoficisto, deziras interŝanĝi il. Pk. k. ĉ. l. kaj korespondadi kun seriozaj gesamideanoj el okcidentaj kaj orientaj precipe eksterŝtataj ŝtatoj. Interŝangas ankaŭ esperantajn, naciajn kaj il. gazetojn kaj pm. [1] Arkadaka Esperantista Grupo, s-o D. V. Albanov, Arkadk Saratov, gub. Rusujo volonte korespondas kun ĉiuj landaj gesanoj L. Pk. il. Pk., kaj interŝangas pm [1]

S-o Johann Kuba, ĉefinstruisto, Hermansfein apud Arnau, Ĉeĥoslovakio, interŝangas il. Pk. kun eksterlandaj gesamideanoj. Ĉiam respondas. [1] Filatelistoj! Por 2 svis. fk. aŭ egala valoro mi sendas 50 div. malofitajn poŝtmarkojn de la liberŝtato Danzig. Interŝangas pm. Oskar Köhler, Ölpnitz i. Vogt, Bergstr. 5. [4] Fotoĝrafiajn pri Esperantistoj kaj famuloj kolektas s-o Aleksandro Vandro, Bucuressti, Romanujo, Informejo Cinema Select, Calea Victoriei 48. Rekompencas per poŝtmarkoj aŭ poŝtkartoj laŭdeze. [2]